

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
***XI-a Jaro***  
~~~~~

PARIS V^e

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. L. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **París**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Mannet Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Esperon*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačoskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.



ELDONOJ

DE LA

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(akcia societo
de diverslandaj Esperantistoj)

PARIS, 5^e

33, rue Lacépède, 33.

La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.

Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tute verkita en Esperanto, de P. FRUICIER. Klariĝas aparte la uzadon de l'artikolo, verboj, participoj, tempoj kaj modoj, prepozicioj, ktp. Ebligas rapide akiri bonan stilon en Esperanto. 1 fr. 50. — 1 fr. 60.

Esperanta Versfarado, de TH. CART kaj PARISOT. Klariĝas per ekzemploj tiritaj el la Esperanta literaturo, kiamaniere D-ro Zamenhof kaj la plej fortaj poetoj esperantistaj ritmigus siajn verkojn. Gvidilo por gaudi la ĉarmon de la esperantaj versaĵoj. 30 cent. — 35 cent.

Frazlibro de l'Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto por la vojaĝo kaj ĉiutaga vivado kun tradukoj angla, franca, germana, hispana kaj itala; resumo de la esperanta gramatiko en kvin lingvoj; adresaro de grupoj esperantistaj en la tuta mondo, k. a.; nova eldono (3-a) en presado.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

ELDONOJ DE LA
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris
(Daŭrigo)

- Kurloza Sunhorlogo**, de S. POLJANSKIJ. Montras, kiel oni povas facile konstrui praktikan sunhorlogon en ĉiuj lokoj sur la tero; kvar desegnaĵoj kaj tabeloj klarigas la tekston; 2-a eldono. 20 cent. — 25 cent.
- Trafendita Turo**, originala versaĵo en Esperanto kun franca traduko de TH. CART. Luksa broŝureto, vendata por la propagando inter blinduloj. 25 cent. — 30 cent.
- Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina?** Artikoloj tiritaj el *L'Espérantiste*, france kaj esperante verkitaj de L. DE BEAUFONT; enhavas ĉiujn argumentojn kaj rebatojn pri la akcepto de latina lingvo kiel internacia; ebligas facile rebati la tiel ofte faratajn kontraŭdirojn. 60 cent. — 70 cent.
- Perdita kaj Retrovita**, originala legendo en Esperanto verkita de E. BOIRAC, rektoro de la Dijona Universitato. 60 cent. — 65 cent.
- Edziĝo Kontraŭvola**, unuakta komedio de MOLIERE, tradukita de V. DUFREUTREL; — ludita en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer: 60 cent. — 70 cent.
- Homa Doloro**, poemo originale verkita de FBZ. 30 cent. — 35 cent.
- Paŭlo kaj Virginio**, de BERNARDIN-DE-SAINT-PIERRE, tradukita de H. HODLER. 1 fr. 25. — 1 fr. 45.
- Ruĝa Floro**, rakonto de V. GARŠIN, tradukita de K. BOGUŠEVIČ. 30 cent. — 35 cent.
- Sep Rakontoj**, originale verkitaj en Esperanto, de IVAN MALFELIČULO. 1 fr. — 1 fr. 15.
- Rolandkanto** (*Chanson de Roland*), tradukita en Esperantaj versoj, de D-ro NORL. 1 fr. 50. — 1 fr. 70.
- Grasa lignaĵisto**, tradukita el itala lingvo, de G. CHAVET. 50 cent. — 55 cent.
- Elementa fotografa Optiko**, de KARLO VERKS. Tiu verko montras kaj difinas la diversajn esprimojn teknikajn, kiuj estas kutime uzataj en fotografa optiko; — 1 broŝuro 12×19 cm. da 80 paĝoj kun klarigaj ilustraĵoj. 1 fr. 25. — 1 fr. 40.
- Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto en Boulogne-sur-Mer**. 30 cent. — 35 cent.
- Esperanta Radikaro**, de TH. CART, por blinduloj kaj neblinduloj. Entenas sen la traduko la radikojn, kiuj troviĝas en niaj diversaj vortaroj. Tre oportuna libreto por lerni radikojn. 60 cent. — 65 cent.
- Instruado de Esperanto per bildaro**, broŝureto kun ilustraĵoj, por ekzercoj de interparolado. 25 cent. — 30 cent.
- La Benkoj de la promenejo**, de J. JOUY, tradukita de P. CORRET, Amuza tedmonologo. 20 cent. — 25 cent.
- Mallumajoj**, rakonto, de ABONYI ÁRPÁD, — tradukita el la hungara lingvo de LÉNGYEL PÁL. 60 cent. — 70 cent.
- Les Mots Esperanto groupés selon le sens**, par MARCEL BOBIN. 1 vol. 11×17 cm. de 130 pages. 1 fr. 25 — 1 fr. 35
- Notions élémentaires d'Espéranto et Exercices de Conversation**, par TH. CART. — Vendu au profit de la propagande parmi les aveugles. — Deux fascicules. 25 cent. — 35 cent.

AVIZO GRAVA. — Ni petas niajn klientojn, ke ili volu aldoni por la abonoj al gazetoj aliaj ol « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto », po 10 centimoj.

La poŝtmandatoj devas esti adresataj **ne** persone, sed al la **Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Parizo.**

Se nomo de poŝtoŝeĵo por la pagejo estas bezonata, oni donu « **Bureau de poste N° 29, Rue Monge, Paris** ». Ni al-tiras speciale sur tiun gravan punkton la atenton de niaj klientoj anglaj kaj amerikaj; sen tiu sciigo, ni havas multajn mal-facilaĵojn por enspezi tiujn mandatojn.

A. V. Aleksandrov, *Jalta, Ruslando*, deziras korespondadi per leteroj aŭ ilust. poŝtk., kun neeŭropaj geesperantistoj.

GUSTAV SCHWENGELER, *Hegi (Zürich), Schweiz*. — Rekomendas sin kiel citra instruisto. Instruado laŭ normala kaj viena metodo. Studado de kantoj kaj aranĝoj de koncertoj. Programo da 700 numeroj. Gaja kaj serioza muziko. Atestoj al servoj.

Oni deziras aĉeti jenajn numerojn de gazetoj :

Lingvo Internacia : 85 (Jan. 1903). — 95 (Nov. 1903). — 97 (Jan. 1904).

La Lumo : 1903. — n-rojn 4 — 7 — 8 — 9 — 10. etc. ĝis laste eldonita.

Sin turni al **Librejo L. Lamiot**, Céret, P. - O., France.

A. S. FEDORČENKO, studento, *Ruslando*, (Crimée), Jalta, San « Sastria », deziras interŝanĝi salutojn kun esperantistinoj ĉiulandaj per ilustritaj estetikaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de urboj, kaj portretoj de societaj eminentuloj kaj geartistoj francaj. — Responde li sendos artan poŝtkarton.

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpresado estas senpaga ; ĉiu nova enpresado kostas 50 centimojn, deĉdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Presa Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

Glasgow, 137, Weet Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Breslau 6, Alsenstr. 26 I (Germanujo), — *K. Wallon*. Maŝinoj por viandistoj, kolbasfabrikantoj, por konservfabrikado kaj maŝinoj por fabrikadi ladajn skatolojn. Mi uzas Esperanton en mia korespondado. Esperantistoj, kiuj aĉetas maŝinojn ĉe mi, ricevos specialan rabaton.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : **PARIS**, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1 majo 1906

D-ro Toulouze : La mezuro (trad. S-rino SERVIN)	257
Mamin-Sibirjak : Helenjaj fabeloj (trad. N. KABANOV) .	261
L. Jeanneret : La lacerto (trad. P. V. 12258	263

Tra la mondo Esperantista

G. Kolowrat : Senarbitreco de Esperanta gramatiko	264
Gazetarò Esperantista	263
Diversaĵoj	271

Nia aldono literatura (paĝoj 129—144) : **Rememoro pri Solferino**, de H. DUNANT (tradukis VAILLANT kaj FRUICIER), *daŭriĝo*.

LA MEZURO

Vazo enhavas neŝanĝeblan enhaveblecon. Se ĝia entenebleco estas unulitra, vane oni penados, por ke ĝi ricevu kelkajn centilitrojn pluajn. Tiam la homo estas haltigata de la materio, kiu ne cedas je lia kaprico ; kaj devige li devas kontentiĝi, metante en sian litron nur unu kilogramon da akvo.

Sed pri lia korpo, li rilatas al ŝtofo multe pli fleksebla kaj aliformigebla. Se li volas preterpasi la mezuron, li ne sentas sin retenatan — en sufiĉe grandampleksaj limoj — de ia ĉefa malfacilaĵo, kaj li havas la iluzion, ke li ĉion povas.

Jen la ĉefa kaŭzo de la homaj malfeliĉetoj nekoni sian mezuron, la penadon fareblan en ĉia grado de sia aktiveco. Tio estas ĉapitro de la vivarto, kiun mi volas skizi hodiaŭ.

Diri, ke ĉiu havas sian mezuron, limon por siaj fortoj, tio estas eldiri principan veron, kiu ŝajnos negravaĵo. Sed tiu principo estas tute indiferenta por la plejmulto de la homoj, kiuj agas tute same kvazaŭ ĝi ne estus.

Laŭvere, ĉiu konas sin malbone kaj nescias ĉion pri si mem ĉefe en la fako de sia farto kaj kontraŭstareco.

Antaŭ nelonge, mi ekzamenis malfortikan junulon, kun mallarĝa brusto kaj kies vangostoj elstarantaj kaj ruĝe makulitaj antaŭsciigis min, — inter aliaj montroj — pri ftizo jam karakterizita. La malfeliĉulo opiniis, ke li estas tre fortika kaj kapabla elporti la plej maldolĉajn suferojn ; kaj, frapante sur sian kompatindan malgrandampleksan brustokeston, li fiere diris « Mi estas iom lacigita ; sed la kesto estas bona ! » La plejmulto el niaj malsanoj devenas de tia memnescio.

Kiu estas reŭmatismema, tiu ĉi ŝatas la sportojn, kie oni devas maltimi la malsekecon de l'aero kaj tero. Tiu alia, kies koro ofte batas malsaĝe, estas fervorulo de rapidecaj sportoj, kiuj devigas lin al penadoj danĝeraj por lia interna sangirado.

Tiaspecaj iluzioj estas vere miregigaj, pro ilia persisteco kaj kontraŭbatalo al korekto de la realo. Mi havis, dum mia juneco, amikon, kiu pretendis sin multmanĝulo. Nenio difinis lin por tia rolo, nek la entenebleco, nek la toleremo de lia stomako, kiu estis farita male por malgranda apetito. Sed tio estis lia honorpunkto, strange lokita por delikata spirito, kiel la lia. Kaj lia gloro estis engluti grandegajn miksaĵojn, kiujn plej ofte li ne povis digesti. Tio nek korektis, nek instruis lin, kaj por subteni sian famon, li kondamnis sin je la turmento de la super-satigo, estante samtempe kompatinda kaj ridindega, penadante kaj ŝvitante por engluti fluidaĵojn kaj malfluidaĵojn, kiujn ankoraŭ pli penadante kaj ŝvitante, li devis baldaŭ redoni al la tero.

Aliaj, — kaj ĉiu havas pli-malpli tiun difekton — konas sian malfortan punkton, sed agas egale, kvazaŭ ili ne konus ĝin. Kaj kontraŭ tiu konduta difekteto, ĉiu devas kutimigi sin je batalo, ĉar ĝi naskas multe da malbonaĵoj, pro kiuj oni suferos ian tagon.

Mi raportis pli supre pri la okazo de unu kvazaŭ-multmanĝulo, kiu rememorigas pri la rano provanta imiti la bovon. Sed kiom da aliaj homoj agas simile ĉe l'okazo ! Oni vespermanĝas kun amikoj kaj oni ne volas apartiĝi de ili, ŝajnante tro sobrema. Tiam oni suferas pro malbona digesto, kiu iafoje poste elvokas tutan serion da okazoj pretaj por aperi, nome : kapdoloroj, atako de stomakdolorado aŭ eĉ de podagro. Kaj kial oni faris tion, mi demandas ? Por oferi al kvazaŭa ĝentileco ; kaj ĉar oni kredas, ke oni devas akcepti manĝaĵojn malprudente laŭditajn, oni elmetas sin al risko de malsano.

Ankoraŭ pli ofte la drinkaĵoj estas pretekstoj por tiuj bedaŭrindaj faroj. La kutimo trinki pli ol oni povas, estas preskaŭ ĉiam havita de la junuloj pro imitema emo. La unuan *apertivon* oni glutas kiel kuracilon; sed la nova adepto maltimas ĉiujn malsanetojn, por ke oni povu diri pri li « Li estas vera viro ». Pli malfrue la sama antaŭjuĝo kuraĝigas lin en la maldolĉa vojo de la drinkulo kaj la lastaj avertoj de la naturo estas necesaj por ke li devigu sin — tro malfrue — ne plu preteriri sian mezuron.

Por la kutimoj, la plej granda malamiko de la malfortulo estas la fortulo — ne ĉar la unua estas premegata de la dua, sed ĉar li volas tiun ĉi imiti por ĝui la allogon, kiu sin ligas kun la potenco sub ĉiuj ĝiaj formoj. « Tute enteni la litron » estas supereco el fizika ordo, kaj sekve el speco, kiu ĉiam estas de ĉiuj sekrete admirata, eĉ de la spirituloj. Individuo, kiu havas kapablecon tre superantan tiun de la meza nombro de la homoj, estas pro tio tre danĝera por tiuj, kiuj vivas proksime al li kaj volas pli-malpli imiti lin. Mi observis junulon, kiu estis fervora biciklisto kaj sufiĉe modera en siaj ekzercoj. Li ekkonatigis kun sportisto tre vigla, kiu trenis lin en kurojn indajn je profesiuloj. Pro ili, tiu ĉi neniel suferis, sed la alia estis devigata liveri sian tutan forton kaj preteriri siajn kutimajn povojn. Li penadis sur la krutaĵetoj, perdante la spiron, malfortigante tiamaniere, ke malŝatante siajn malsanetojn, li fine ekricevis ~~kormalsanon, pro kiu li preskaŭ~~ mortis kaj kiu longatempe duone kripligis lin.

Aliaokaze, la entreno sidas en la spirita laboro. Ĉe la lernejoj, precipe tiuj, kiuj preparadas al malfacilaj konkursoj, la superemo estas danĝero por la memestimaj malfortuloj. Lernantoj ne tre lertaj, sed obstine celantaj egalvalori la aliajn, alvenas al la fino de siaj studoj lacegaj kaj malpliigitaj ĝis stato de senvaloruloj. Tio ĉi estas meditinda por la gepatroj kaj profesoroj je la momento, kiam la lerneja vivo rekomencos febra.

Por la plimulto, je ia momento de la estado, la nokta vivo ekzercadas sian fortan allogon kaj instigas al similaj ne-singardemaj faroj. Oni imagas la suferon de la erariĝintoj, kiuj ne pli estas faritaj por imiti la fortikulojn, ol maljuna oficisto por direkti ribelon. Tie la plej inteligenta homo submetos sin je la plej malspritaj ceremonioj. Mi rememoras, ke, kiam mi estis studento, mi estis ano de junularo malmulte drinkema. Sed

aliĝis al nia grupo, bierameganto, kiu facile englutis ses ĝis ok litrojn da fluidaĵo ĉiuvespere. Iom post iom ni malsaĝe estis instigataj kompari nin kun li en tiu stranga ekzerco. Kaj vespere, oni sur la tablon alportigis bareleton ; ĉiu per la krano plenigis sian glason tuj kiam ĝi estis malplena. Tro insistante kaj ricevante veran dutagan malsanon, oni sukcesis gluti du aŭ tri litrojn da biero, dum la ne-imitebla modelo glutegis ses elegante kaj dum li paroletis, apogante siajn kubutojn sur la marmoran tablon.

La unua devo al si mem estas kontraŭbatali tiajn fluojn kaj zorge en ĉiuj cirkonstancoj proporciigi sian penadon kun sia kapableco. Scii kion faras la aliaj ne estas grava. Nur estas tia la ĝusta kono pri tio, kion oni povas fari, kaj nur tion fari. Alie agi estas kontraŭe iri al la celo ; ĉar oni estas preskaŭ certa, ke oni devos halti — kaj eĉ kelkafoje tre longan tempon — post kiam oni estos kurinta, pli ol nia forto permesas.

Praktikante tiujn konsilojn, oni povas eviti la senfortigajn malsanojn, la plej multon el la nervaj, kaj ĉefe la ftizon. Oni devas labori, manĝi, dormi laŭ siaj bezonoj kaj forto. Neniu en tio estas egala je la aliaj ; jen kono, kiu kvankam ĝi estas iom kontraŭa je la politikaj ideoj pri egaleco, devas esti enradikigata en la junulojn. Se oni havas amikon, kiu senĝene povas veturi bicikleton po dudekkvin kilometroj ĉiuhore, tio pruvas, ke li havas fortikan koron kaj bonajn pulmojn, sed tute ne, ke la viaj devas esti tiaj. Same estas pri ĉio.

Rilate al la ĉiutaga laboro, facile oni kutime eksentas, kiam oni preteriras sian mezuron. Precipe se la laboro estas fizika, la dormo ne mallacigas kaj oni vekiĝas ankoraŭ lacega ; la manoj fariĝas nelerta kaj la movoj estas neprecizaj, tremantaj.

Kiam la spirito preterpasas sian forton, unue la sendormeco antaŭsciigas nin. Oni malfacile ekdormas, kaj multfoje vekiĝas. Sed tio, kio estas plej karakteriza, estas la priokupado pri la laboro, kiu persistas kiel obsedo neforigebla. Tuj kiam la penso plu ne estas ekstreme okupata, ĝi aŭtomate revenas al tiu punkto. Tiam la objekto de la laboro, ĉiam staras en la spirito. En tiu momento la mezuro estas preterpasita kaj oni devas fari ĉion eblan — kaj ĉefe ripozi — por retrovi la pensan trankvilon. Iafoje atendante ĝis la morgaŭa tago, oni riskus neebliigi la aferon.

La unua grado de la cerbaj konfuzaĵoj, kiuj alkondukas

al la frenezo, estas la nevola uzo de la funkcioj. Dum la trolaciĝo, la penso inklinas liberiĝi de la vola kontrolo kaj tuj kiam ĝi ne estas plu submetita per daŭra penado, ĝi senĉese turnas sin al la okupo, kiu trudas sin al la spirito. Neniu estas certa, ĉe tiu momento, ke li povos halti sur tiu ĉi glitejo, se li ne energie agas. Kaj male mi scias per observadoj liveritaj al mi de miaj malsanuloj, ke tiam la frenezo ofte povus esti haltigita.

Fine mi ne devas silenti pri emo al seksa funkciado.

En tiu fako, ne ĉiuj, kiuj ĝin deziras, faras troaĵojn. Sed la provoj de troaĵo preskaŭ tiom malfortigaj estas, kiom la troaĵoj mem kaj estas pli facile atingeblaj de la malpli kapablaj. Scii esti sobra en amo estas ankoraŭ malofta virto ; ĉar en tiu ordo la supereco estas pli ŝatata, tial ke ĝi estas plej glordona. Tamen oni devas scii submetiĝi, kiam la naturo aŭ la aĝo murmuretas en nian orelon, ke oni elspezas pli ol oni devus fari.

Kio estas plej malbona, tio estas, ke la homo estas ĉefe fierema posedi tion, kion li ne havas. Kaj la iluzio estas tiel facila por li ! Ĝia korpo estas pli fleksebla ol la vazo, kaj ĝi povas ricevi — per paradoksa efiko — pli ol sia entenebleco. Tiam la tento estas tro forta, por ke oni ne provu ĉiumomente efektiviĝi tiun mirindaĵon. Des pli malbone, cetere, se interne ĉio rompiĝas sub la penado.

D-RO TOULOUZE.

Esperantigis S-RINO SERVIN.

HELENJAJ FABELOJ

— *Mamin-Sibirjak* —

Mamin-Sibirjak, unu el la plej talentaj verkistoj rusaj, elverkis kelkajn kolektojn da infanaj fabeloj. La plej konata estas la kolekto « Helenjaj Fabeloj » ; tiuj ĉi fabeloj estas eksterordinare poeziaj, precipe la komenco kaj la fino de tiu ĉi kolekto. Tiujn ĉi du pecojn ni proponas sube.

Antaŭfabelo

Baju, baju, baju !

Unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia rigardas ; unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia aŭskultas.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino ; la patro dume rakontados fabelojn. Sajnas, ĉiuj estas tie ĉi kaj la kato, kaj la vilaĝana hundo kun malordigitaj haroj, kaj la griza museto, kaj

la grileto ĉe la forno, kaj la multkolora sturno en la kaĝo, kaj la malpacema koko.

Dormu, Helenjo, tuj la fabelo komenciĝos. Jen jam la alta luno rigardas en la fenestron ; jen la straba leporo eklamis sur siaj piedetoj ; lupaj okuloj eklumiĝis kiel flavaj fajretoj ; la urso suĉas sian manegon. Ekalflugis al sama fenestro la maljuna pasero, frapas per la beko en la vitron kaj demandas : « Ĉu baldaŭ ? » Ĉiuj estas tie ĉi, ĉiuj en kolekto, kaj ĉiuj atendas la Helenjan fabelon.

Unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia rigardas ; unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia aŭskultas.

Baju, baju, baju !

Fino

Baju, baju, baju...

Unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia rigardas ; unu okuleto ĉe Helenjo dormas, alia aŭskultas.

Ĉiuj nun ekkolektiĝis apud Helenja liteto : kaj la kuraĝa leporo, kaj la urseto, kaj la malpacema koko, kaj la pasero, kaj la korvineto kun nigra kapeto, kaj la malgrandeta, malgrandeta skarabeto. Ĉiuj estas tie ĉi, ĉiuj apud Helenjo.

— Patreto, mi amas ĉiujn... — murmuretas Helenjo. Mi amas ankaŭ nigrajn blatojn, patreto...

Ekfermiĝis alia okuleto, ekdormis alia oreto.... Apud Helenja liteto verdiĝas gaje la printempa herbeto, ridetas la floretoj, multe da floretoj ĉielbluaj, rozaj, flavaj, bluaj, ruĝaj. Ekkliniĝis super la liteto la verda betuleto kaj murmuretas ion tiel afable, afable, kaj la suneto lumas, kaj la sableto flaviĝas kaj vokas al si Helenjon la blua marondo....

Baju, baju, baju !

El la rusa tradukis N. KABANOV.

LA LACERTO

Infana rakonto

De L. Jeanneret

En novembra mateno, mi promenis kun Fileto sur la *Ponto Stona*. Erarinta lacerto, kun ĉiuj membroj tremantaj, penade rampis sur la balustrado, ne vidante nin. « Mi ĝin deziras » diris la infano. Mi, kvankam malsperta ĉasisto, tamen kontentigis la malsaĝan kapricon. Poste ni forportas hejmen la besteton en faldita tuko kaj faligas ĝin sur herban liton apud bonega fajro flamanta. Petro ĝojegas, saltadas « Nu ! ne timu ! Kiel vi estas gracia ! Ni tuj donos al vi sukeron, karulo ! » Sed la ĝojo de l'infano rapide malfortiĝas. Baldaŭ la besteto estas forlasata kaj oni ne parolas plu pri la kompatinda malliberulo, kiu konsumiĝas senespere en la fundo de granda korbo.

Panjo bonfareme petegas, por la kaptito : « Vi reportu ĉi tiun lacerton sur muron, ie ajn ; ĝi sukcesos sen helpo reiri al sia nesto ». — « Jes » diras Fileto. Kiel kutime mi cedas kaj kisas la infanon ĉar li ne rifuzis helpi tiun savon. Papera korneto, rapide farita, utilos kiel kaĝo ĝis la *Ebenigita Remparo*. Jen nia sklavo estas feliĉe liberigita. Sed la pluvo malsekigis la teron ; la aero pli malvarmiĝis. La besteto, rigidiĝinte, ne moviĝis plu. Ĝi estis ankoraŭ tie, senmove, apud sia malfermita malliberejo, je la horo, kiam aŭdiĝis l'Angelus'a sonoĝado ; ĝi tie estos ĉiam, kun maldika kapo rektigita, kvazaŭ peteganta la Dian venĝon, morgaŭ, postmorgaŭ, kvazaŭ figuro de la konscienca riproĉo, la malgranda griza lacerto mortinta pro nia kulpo. Petro fariĝis seriozmiena « Vidu ! ĝi kulpigas nin, ĉar ni ĝin mortigis per malvarmo. Alian fojon, Paĉjo, rifuzu, kiam vi ne rajtos min kontentigi ». Kaj mi mallevis la frunton, mirante, ke infano tiel ekdefendas la malfortulojn, la suferantojn kaj pli bone ol mi aŭdas en la fundo de la koro la voĉon dirantan « Estas necese, ke la bono venku ĉie, en ĉio, kaj ke la tuta vivo obeu al la sanktaj leĝoj de l'amo ».

Kun la permeso de l'aŭtoro

esperantigis : P. V. 12258.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Senarbitreco de Esperanta gramatiko.

Mi kelkfoje aŭdis atakojn kontraŭ l'internacieco de Esperanta gramatiko. Oni konsentas pri la natureco de l'vortaro, sed ne volas atesti la senarbitrecon de la gramatiko; nenia principo, oni diras, estas enmetita en la elekto de finaĵoj. Mi provos elmontri la malon.

Ĉiu finaĵo estas tiom ĝustaloke, ke ĝi estas ne nur ebla, akceptebla, sed ĉiam nepra, neanstataŭebla. Por substantivo la sola elektebla vokalo estas *O* (*e* devas esti allasita al adverboj), ĉar *A*, kiu penas konkuri kun ĝi, havas je unu voĉo malpli en la voĉdonado de niaj lingvoj. Efektive, *O* kaj *A* estas indiferente substantiva kaj adjektiva finaĵo lätine, greke, hispane, portugale, itale, ruse, serbe, pole ktp., sed la *O* estas preferota por substantivo ĉar en latina lingvo *O* ne formas adjektivojn, sed nur substantivojn (homo, ordo). Alia tre grava motivo decidiganta la elekton de tiu finaĵo estas la fakto, ke *O* troviĝas en la finaĵo *on* de multaj internaciaj substantivoj, kiel pensio, religio, opinio, nacio, stacio, redakcio, profesio, akcio, skadro ktp. ktp. Do, tiu elekto difinas ankaŭ la vokalon por adjektivoj *A* estas plej internacia. (Ni jam montris la lingvojn havantajn ĝin; rimarku plie, ke *A* estas sufiĉe ofta finaĵo de ŝvedaj adjektivoj). Sed aliparte, ankoraŭ, la akcepto de *A* estas postulata de tio, ke ĝi kuŝas en finaĵo de amaso da internaciaj vortoj, nome en *al* — natura, imperia, centra, filia, horizonta, gramatika, fina, poŝta, individua ktp. ktp. —, en *ar* — elementa, milita, angula, popola —, en *an* — amerika, krista, urba, homa. Por adverboj sin prezentas kandidatoj *E* kaj *O*; la unua apartenas al latina, itala, hispana, portugala, rumana, slavaj (krajne, daleje), la dua nur al slava, klasika greka lingvoj kaj, al kelkaj vortoj de latina (raro). Sekve, des pli ke la *O* estas jam retenita de substantivoj, l'adverboj devas

kontentiĝi per *e*. Koncerne l'infinitivon, ĝin ĵaluze atendas *i*, trovata en latina (pati, hortari, sentiri), slavaj (imati, nesti), greka (ejn = in laŭ Reichlin'a legmaniero, iafoje en moderna greka γράψει) kaj, se oni permesos citi alifamilian lingvon, ĉiam en hungara. Ankaŭ, ĝi servas kiel karaktera signo en la infinitivoj franca kaj hispana *ir*, itala kaj latina *ire*, germana *ieren*, (hausieren, probieren, spazieren), slavaj irovati (demonstrirovatj, filtrirovatj)*; en angla *ish* (distinguish, finish, punish = distingi, fini, puni), en greka *iz*, sudslava *is*. Sed eĉ se la akceptigoj ne estus tiel multaj, oni devus preferi *i* al restanta *u*. Tiu lasta falas al la vola modo (kiel greke ἔρχου aŭ λούου, hebree kaj arabe), kiu, vere, ne havas en la naturaj lingvoj ian pli komunan vokalon (vidu en ĉiuj lingvoj: da, tima, mangia, age, trinke, jette, lege, dormi, veni, piŝi). Klarigo: la leganto eble miras, kial ni okupas nin pli frue pri la vola modo ol pri la indikativaj tempoj aŭ pri adverbo antaŭ ol pri akuzativo. Nu, en ĉiuj lingvoj la vola modo celas esti pli mallonga, pli simpla ol la indikativo, la volo malsekvas ĝian plenumiĝon, tial ĝuste ni preferas -la donitan al ĝi *u* ol ian *as*, *is*, de l'indikativo; la vola modo esprimas ne ke io estas aŭ povas esti, sed kunportas apartan specon de deoj — tiun apartecon konformas alirigarda ekstero, nome la unulitereco de l'finaĵo. Aliparte, la diferenco inter kazoj kaj nombroj ne estas tiom grava kiom tiu inter parolpartoj — tial ni plej zorgas pri parolpartoj. L'akuzativo** bezonas konsonanton kiel finaĵon, ĉar vokalo post vokalo estus terura malbelaĵo. Plej internacia konsonanto estas *n*, uzata en greka (νόσον, ἔριν, κκκίαν), en germana (den, Namen, Grafen) lingvo, en nazaj polaj sonoj (noge — nogen = piedon). La malpli belsonan *m* konas nur latina lingvo, aliajn konsonantojn la eŭropaj lingvoj ne havas por l'akuzativo. Sed se ni alprenis *n*, ĝi devas servi al ambaŭ nombroj, do ĝi estu algluebla al la multnombra finaĵo. Efektive, la multnombro estas vidigota per almeto de sono, sed ne per anstataŭmeto, ĉar, se tio estus, oni bezonus du apartajn finaĵojn, unu por la substantiva, alian por la adjektiva (kaj eĉ pronoma) mult-

* Oni rimarku, ke eĉ la alilingvaj *ar*, *er* transformiĝas slave kaj germane en *ir*.

** Mi ne kritikas Esperantan Sintakson; tial mi ne tuŝas la demandon pri neceseco de akuzativo, de adjektiva ŝanĝiĝo, pri formoj; supozinte la formaron fiksitaj mi serĉas nur finaĵojn.

nombro, kio tre malsimpligus la lingvon kaj, aliparte, ĉar ĉiuj vokaloj estas okupitaj kaj oni neniel povas anstataŭigi la ununombrajn finaĵojn fiksitajn laŭ sola ebla maniero. Alivorte, ni devas trovi finaĵon por la multnombro, kiu estus kombinebla kun antaŭiranta vokalo kaj sekvanta akuzativa *n*, sekve zorgi ke la kombinoj *a* + fin. + *n*, *o* + fin. + *n* estu facile elparoleblaj. Tiajn kapricajn kondiĉojn kontentigas nek vokaloj, (ekz. *aon* ne estas uzebla pro malbeleco kaj pro okupiteco de *o*), nek konsonantoj (ekz. *atn*, *orn*, *asn*...); konvenas nur la « duonvokalo » *j* (*ŭ* estus pli neoportuna, precipe en *oŭn*). Ĝi (en multaj lingvoj ne distingata de *i*) estas internacia, uzata en la antikva greka (δοῦλοι, πηγαί), litva (laukai) lingvoj kiel *j* kaj en aliaj similforme kiel *i* (novgreka duli, latina servi, itala vini, rum. pohari, slava knigi, junaki).

Nia lasta ŝuldo estas decidi pri la indikativa kaj kondiĉa modo kaj pri la participoj. La proksimsenceco de l'indikativa kaj kondiĉa modo volas ke iliaj lastaj konsonantoj estu samaj (la finaĵo certe havos formon: vok. + kons., ĉar la vokaloj ne estas plu preneblaj kaj la konsonantoj post konsonantoj aŭ vokaloj post vokaloj ne estas kunmeteblaj). Tia konsonanto povas esti 1) *t* (latina amat, germana liebt, rusa dajot), 2) *s* (latina amas, amamus, franca aime, aimeras, angla loves, gives, greka ἔχεις, slava dajoŝ, hungara k. al.; *s* estas l'indikativa signo de l'sveda pasivo); 3) *n* (greka ἔλεγον, hispana son, germana lesen). *T* ne konvenas, unue ĉar ĝi malagrabla incitus l'orelon (*li* dirit ke vi venot kaj parolot, se li estot sana), due ĉar ni tre bezonas *t* (kiel internacian sufikson) por la participo. La malpli internacia *n* estas, de nenio anstataŭebla, gardata de l'akuzativo. Sola *s* estas akceptebla. Neniu lingvo havas sisteman signadon de tempoj (ordinare unu sama tempo havas kelkajn vokalojn, laŭ kies diverseco oni nomas la deklinaciojn), tial ni devas mem difini, kian vokalon (antaŭ *s*) havos la tri indikativaj tempoj kaj la kondiĉa modo. Ni fondos nin sur la pligraveco de tiu aŭ alia formo kaj al pli grava donos pli maldekstran literon de la kutima ŝtoparo (aeiou). Do, la estanta tempo kaptas *a* (lat. amat), la estinta *i* (amavit), la estonta *o*, la kondiĉa *u*. Ni forĵetis la vokalon *e*, ĉar *es* estas malpli belsona ol *as*, *is*, *os* kaj ĉar *et* estas tre necesa malgrandigilo. Tiamaniere en la vokalaro ni havas

gradan ordon: estanto, estinto, estonto laŭ la malgrandiĝo de realeco kaj konateco de tempoj. La kondiĉa formo staras aparte en la vokalaro, ĉar ĝi formas apartan modon kaj havas malplej realan karakteron. Analogie kun la malplia komuneco de diversaj parolpartoj ol de diversaj verbaj tempoj, la parolpartaj finaĵoj pli diferencas ol la tempaj, ekz. *as* pli diferencas de *is*, ol *a*, de *i* (en la unua okazo samsonas unu litero, en la dua — neniom).

Restas nur la participoj. Ili estas tritempaj, tial plej logike kaj nature estas, ke iliaj finaĵoj aŭ sufiksoj havu samajn vokalojn kiel l'indikativo; ni nur anstataŭigu la *s* per aliaj konsonantoj. Por esti distingilo de l'aktivo proponas sin *nt*, konata de la latina, greka kaj franca en sama formo, de la angla, itala, hispana... en simila stato kaj renkontata en multaj tute internaciaj vortoj (fabrikant, demonstrant, komendant, brilant, referent, student ktp.) La *nd* estu konservita por la gerundivo (aminda). Por la pasivo ĉiuj lingvoj preskaŭ unuanime voĉdonas por *t* (latina, greka — γραφτός, ἀγαπητός, — franca, itala, rumana, germana, sveda, norvega, hungara, ĉiuj slavaj), la angla, hispana kaj portugala por la tre simila al ĝi *d*, malpli akceptindan pro malplia internacieco kaj malplia paraleleco al *nt*. Rememoru, krome, ke *t* ekzistas en internaciaj deputat, citat, traktat, kantat, fabrikat, laŭreat, referat, kredit ktp. Tiamaniere ni ricevis tre internaciajn participajn formojn je *ant*, *ont* (greka), *at*, *it* kaj analogiajn *int* kaj *ot*.

Ĉu ia kaprico, ia arbitreco ekzistas en Esperanta gramatiko? Uzinte tute teorian, elektan, « forstrekan » metodon kvazaŭ forgesinte pri Esperanto, ni venis al la sama rezultato, kiel ĝia aŭtoro. Mi ne diras, ke li matematike elkalkulis la formojn, sed ja precize en genio estas io senkonscia, io sengvida, pretervola. La Esperanta gramatiko do estas ne elpensita, arbitra, senkaŭza, kaprica, sed plej internacia kaj natura, ĝi devas esti prezentata ne kiel ebla, bona, konvena, sed, eĉ en ĉiuj detaloj, kiel *sola*, *nepra*, *deviga* rezultato de internacieco akompanata de sistemeco.

G. KOLOWRAT.

Gazetaro Esperantista.

(Daŭrigo.)

Juna Esperantisto, marto. — ANDREAS REMY verkis originalan rakonton pri la morto de maljuna kato. — Daŭrigo de « En la Abismo » de H. Wells. — M. H. N. alfaris por esperanto amuzantan monologon, « La Eĥo ». — P. CHAMPION daŭrigas « S-ro Vento kaj sinjorino Pluvo » el Musset. Kliŝoj montras la portreton de sinjorino Pluvo kaj la manieron laŭ kiu la spiritetoj de l'vento turnigas muelilon. Tio tre interesos la meteorologojn ! — LA KURSISTO detale priskribas du amuzantajn desegnaĵojn « En Restoracio » kaj « La Heroo ». Tio liveras riĉan temon por la buŝa ekzerciĝo en nia lingvo. — Problemoj.

British Esperantist, aprilo. — Nekrologio pri A. Motteau. — Portreto kaj biografio de Kol. Pollen. — Kroniko, Informoj diversaj. D. H. LAMBERT laŭdas la tradukon de « Ĉielo kaj Tero » faritan de D-ro Noel. — J. C. RUST verkis originalan rakontetojn, « La Kalifornia juĝisto » kaj « Du neoĵ faras jeson ». — Kelkaj vortoj pri Hilelismo. — SONO proponas, ke ĉiu Esperantisto sciigu sian konataron, ke li fariĝis Esperantisto ; legu publike sian esp. gazeton, fundamente lernu la lingvon, ĉiam informiĝu pri la nuna stato de nia afero, k. t. p. — R. AUERBACH priskribas urbon Eppan en Tirol. — A. HULME parolas pri la influo de la muziko al la homoj. — C. B. priskribas la vivadon en abelujo. Ekzercoj.

Suno hispana, marto. — E. BAQUET tradukis pecon el A. Daudet, « Du Tartarenoj ». — Kroniko, Bibliografio, problemoj. — Portreto de P-ro Guinart. — En aldono estas daŭrigo de « Kuracisto per batoj » tradukita de V. INGLADA. —

Smeralda Lando, januaro. — Kiel ni fondis la Esperantan Grupon en St-Malo-St-Servan. — Propaganda artikolo franclingva. — Oficiala protokolaro de la Boulogne'a Kongreso. — Diversaĵoj, Ekzercoj, k. t. p.

Svisa Espero, marto 1906. — Kroniko, Bibliografio, novaj aliĵoj, k. t. p.

Lorena Esperantista Ĵurnalo, aprilo. — Kroniko, sciigoj pri konvenoj kaj kursoj de la grupo esperantista.

Esperanto bulgara, 7 februaro (m. s.) — Bulgara parto. G. AKTARDĴIEV montras, ke la solvo de helpa lingvo estas Esperanto. — En Felietono estas komencata raporto pri la ludado de « Edziĝo kontraŭvola » en Boulogne. — B. parolas pri impresoj de l'Kongeso. — G. Slucki raportas pri uzo de

Esperanto ĉe la I-a Kongreso de fizioterapio en Liège. — Kurso de Esperanto por bulgaroj. Sciigoj diversaj. — La esperanta fako estas la sama jam analizita ĉe « Esperanto Franca ».

Algeria Stelo, 5 marto. — Komenco de novelo inspirita de la ribelaj okazoj en Rusujo. — Du vidaĵoj el Algerio. — Fino de « Morto de Martino », esperantigita de A. GALLOIS. — Daŭrigo de « Dekkvinaŭgusta ordenito », el A. Daudet, esperantigita de A. BAISSAC. Diversaj informoj pri la esperantista movado en Alger, k. a.

Espero Pacifista, decembro 1905. — A. CARNIGIE montras, ke Anglujo, Francujo kaj Nordamerika Unuiĝo necesas faros grandan internacian konsenton por konservadi la pacon. — S. H. FRIED kulpigas la politikistojn, « de Münster al Delcassé », kiuj alvokis la nunan malkonfidecon inter Germanoj kaj Francoj. « La konduto de Delcassé estas konsekvenco de l'principo, kiu regas ankoraŭ la internaciajn rilatojn : kiu apogas sian vivon kaj potencon nur sur perforto, devas kalkuli, ke danĝero de milito ĉiam ĉeestas ». — A. WHITE, la konata amerika diplomato, rakontas el siaj rememoroj pri la Haga Konferenco, ke nur malfacile oni povis venki la malfavorecon de la germana imperiestro kaj de lia kanceliero. Sen ilia kontraŭstaro, Eŭropo nun ĝuadus konstantan devigan arbitracian kontrakton internacian kaj povus komenci malgrandigi la militistajn elspezojn. « Grafo Münster proklamis, ke arbitracio estas *humbug*, ke telegrafo kaj telefono estas malbeno por internaciaj rilatoj, ĉar ili embarasas la vojon de diplomatio..., ke la batalo kontraŭ mikroboj estas moderna *humbug*... Li estas plena de ideoj, kiuj estis aŭtoritataj antaŭ 50 jaroj ». Aliparte, oni elektis por decidi pri forigo de diplomatio kaj milito, diplomatojn kaj militistojn : tio estas « Kurioza kaprico de l'sorto ». La aŭtoro diras plue : « La izoleco de Germanujo datumas de la Haga Konferenco, kie la imperio meritis la famon de militema regno... La sensaĝeco de tia konduto estis baldaŭ pruvata. Jam dufoje Germanujo prezentis sin, kiel plendanto, ĉe la Haga Tribunallo, kaj dufoje ĝi subskribis arbitraciajn traktaĵojn, ne perdante ion el sia suvereneco. — S. MEYER parolas kontraŭ la duelo kaj laŭdas la kontraŭduelajn ligojn. En Francujo ekzistas unu, kies adreso estas : grafo J. du Bourg, Château de Moudonville, Haute-Garonne. Nenia kotizaĵo estas postulata de l'aligantoj. — Sciigoj pri la Societo « Pacifisto », en fino de 1905, la nombro de membroj estis 295 ; multaj membroj ne varbas novajn anojn ; tio malhelpas rapidan plenumadon de la programo. En la venonta jaro la meza paĝnombro de la revuo estos 36 ; kelkaj verkoj aperas en la kolekto « Libraro Pacifisma ». — MIKSAĴOJ. Rusujo perdis almenaŭ 353,000 homojn en Manĉurio. — Norvegoj kaj svedoj detruas la fortikaĵojn ekzistantajn sur la landlimo inter ambaŭ popoloj. — Generala rigardo al la politiko franca, germana kaj angla. (G.

MOCH.). — Pacifisma movado. Vortaro pacifisma (ĉambro, ekstradi, kolonelo, memrenoviĝo, Usono). — Korespondado. Tabeloj de enhavo.

Ruslanda Esperantisto, marto 1906. — P-ro A. DOMBROWSKI kritikas hilelismon (homaranismon). Bona flanko de tiu sistemo estas tio, ke ĝi puŝas homojn al konscia rilatado kun Dio, kun la aliaj homoj kaj kun si mem anstataŭ ilia nuna instinktiva kondukado. Sed malbona flanko de hilelismo estas ĝia celo esti supernacia kaj superreligia dogmaro, kiu farigos baldaŭ kaj neeviteble kontraŭnacia kaj kontraŭreligia. La fina celo de hilelismo (unuigo de ĉiuj nacioj) estas tre malnova idealo, jam profetita de Jezuo Kristo. Cetere, pri abomenindeco de persekutoj kaj militoj, pri neceseco de unuigo multe kaj bele predikadis anoj de humanismo, kosmopolitismo, framonismo, k. t. p. sed vane. Hilelismo verŝajne prosperos pli multe en tiu ĉi vojo. — A. GRABOWSKI presigis parton de traduko de tragedio « Mazepo » el Slowacki. — V. LOJKO tradukis rusan rakonton de Naĵivin, « Al Feliĉo ». — Versaĵoj de LEO BELMONT kaj FRENKEL. — Kroniko, Bibliografio. — Originala prozaĵo de WINNICKI. — Traduko de parolado de Hervé al siaj juĝontoj. — A. MONTROSIER respondas al S-ro Devjatnin, kiu en antaŭa numero proponis krei grandan internacian ĵurnalon en Esperanto, ke la Esperantistoj pli bone farus, subtenante la nun ekzistantajn gazetojn. La aŭtoro mem de la propono ne abonas « Tra la Mondo » (Nek ankaŭ L. I.). — Diversaj sciigoj.

Revuo de l'Esperanto, aprilo. — A. M. parolas pri « Esperanto kaj la kutimoj popolaj », kiujn nia lingvo povas konatigi de diversaj nacioj. — A. MICHAUX parolas pri la ĉapeliteroj esperantaj. — Ch. YVARY kritikas la temon de Hamleto. — Karnavalaj kutimoj. — Diversaj sciigoj pri la esperantista movado.

Tra la mondo, marto 1906. — A. BORD priskribis urbon Algeciras (2 vidaĵoj). — O. PRUDENT biografias kardinalon Perrault ; fotografaĵo montras lian enteriĝon. — K. GUTKE parolas pri la « plej norda instituto scienca » starigita en Riksgrensen (Svedujo). — G. CHAVET komencas klarigi la fundamentojn de la decimala klasigo. — Kliŝo el « Journal des Voyages » montras vojaĝantojn, kiu pagas sian lokon ĉe vagonaro laŭ sia prezo. — VAN DER BIEST parolas pri Rubens ; unu kliŝo reproduktas « flandran pejzaĝon » de la fama pentristo ; alia kliŝo montras la pentriston mem. — STELETO priskribas la lastjaran ekspozicion Esp. en Alger (fotografaĵo). — Y. JOULIN raportas pri karnavalo en Nice (5 kliŝoj). — A. GALLOIS parolas pri Vezuvio (2 vidaĵoj). — A. SIMPER daŭrigas sian « Vivado de teplantisto en Hindujo » (2 kliŝoj). — Komenco de felietono « La Torento de Saŭmo » el D. Lesueur, esperantigita de J. FLOURENS. — Du vidaĵoj el Algerio finas tiun interesantan numeron.

Der deutsche Esperantist, aprilo 1906. — Represo de letero de D-ro COUTURAT pri la lingvo internacia (germane). La aŭtoro diras la profundan impreson al li faritan de la Kongreso en Boulogne. — Kroniko. — Fino de germana traduko de « Une heure d'Esperanto ».

La Esperanta Studento, februaro. — Redaktora babilajo. — Infanaĵ paroloj (L. RIGOIR). — Kluba Kroniko. — Nia Gvidistino (ĉirkaŭajo de Brighton). — Pri Bädeker. — La Valentino. — Parolado de D-ro Zamenhof en Boulogne (daŭrigo). — Kongresa Horoskopo (D. H. LAMBERT). — La fratoj de Mowgli (daŭrigo). — Diversaĵoj.

DIVERSAĴOJ

Alvoko. — Esperantistoj (precipe *studentoj*) dezirantaj korespondadi kun *bohemiaj studentoj*, ĉu mezlernejaj (studentoj de gimnazioj kaj realaj lernejoj) ĉu altlernejaj (tiuj de universitato kaj teknika lernejo) volu sendi poŝtkarte sciigon pri tio al sube nomita sinjoro. Kolektitaj adresoj (kun temoj) estos disdonitaj inter studentoj kaj publikigitaj en *studenta gazeto* (bohema), kiu malfermis siajn paĝojn por E.

Sur poŝtkarto volu respondi la demandojn (ankaŭ cifere apartigitajn): 1) via plena nomo? 2) ĉu vi estas fraŭlo aŭ fraŭlino, sinjoro aŭ sinjorino? 3) via detala adreso? 4) via profesio (ĉe gestudentoj: *speco de lernejo kaj klaso*)? 5) jaro de via naskiĝo? 6) via gepatra lingvo? 7) temoj kaj fakoj, pri kiuj vi volas korespondadi? 8) viaj apartaj deziroj? 9) kun studentoj de kiaj lernejoj vi deziras korespondadi? 10) ĉu vi korespondas letere aŭ poŝtkarte. Pri aliĝo al tiu korespondado estas petataj precipe ĉiuj studentaj rondetoj esperantistaj.

Samtempe estas en kreado *studentaj rondirantoj internaciaj*, unu por individuaj gestudentoj, alia por studentaj rondetoj. Estus dezirinde, ke *neniu rondeto manku en ĝi*. Se aliĝos sufiĉe da studentinoj, estos aranĝita speciala rondiranto por ili. -- Ĉiujn aliĝojn, ĉu al korespondado, ĉu al rondiranto, volu sendi al S-ro BOUŠKA HYNEK, Praha-Smíchov 1097, Bohemujo-Aŭstrio.

La reforma manio.

Sajnas, ke revenas la malfeliĉa tempo de « plibonigado » de Esperanto. Multaj esperantistoj volas gloriĝi per ia plibonigo. Unuj volas, ke ĉiu radiko, kiun oni povas verbigi, devas havi sencon verban Ekzemple *spiono* devas (laŭ ili) signifi *spionado*, ĉar oni povas diri spioni, telegrafo kaj telefono devas signifi telegrafado kaj telefonado, ĉar oni diras telegrafi, telefoni. Oni povas diri ankaŭ *soldati* (almenaŭ en flekseblaj lingvoj slavaj oni povas verbigi ĉi vorton) sekve soldato devus signifi — laŭ tiuj reformistoj — ne homon sed agon, kaj sekve por soldato ili elpensus vorton *soldatisto*.

Tia agado povas nur ridindigi nian aferon. Ni fanfaronas, ke la vortaro Esperanta estas vere internacia. Sed ĉu ĝi estos internacia, se ni donos al vortoj alian sencon ol ili havas en aliaj lingvoj ?

Aliaj reformistoj ne povas kompreni, ke iu Esperanta radiko povas finiĝi per *in, er, ar, an, it, id, et, on*, ktp. ĉar « oni povus taksi la finaĵon kiel sufikso ». Se oni volus ĉi tion praktiki, estus necese *krei* vortojn unusilabajn kiel ekz. en Bolak. Mi opinias, ke neniu prudenta homo kredos, ke ekzemple litografo signifas ian *grafon*, kiu kuŝas en *lito*.

Ankoraŭ aliaj volas forigi sufiksojn kaj kreadi nur vortojn kunmetitajn. Ekz. Hungarlando, Bulgarlando, Manĉurlando, Belglando, Moravlando, Franclando kaj pro unuformeco ankaŭ Kanadlando, Konglando, Urugvajlando. Kial ne ankaŭ Ameriklando, Eŭroplando, Afriklando ? kaj ĉar Parizo estas ĉefurbo de Francujo, oni povas skribi : franclandĉefurbo ; franclandĉefurbhomo signifus Parizano. Dua maniero por solvi la demandon pri nomoj de urboj estus analogia kun landnomoj sekve Parizurbo, Berlinurbo, Londonurbo, Kominvilaĝo. Plue : fragarbo, librovenddomo, preĝdomo, lerndomo, preĝlibro, vortlibro, frazlibro, gvidlibro, tranĉinstrumento, ktp. Se ni praktikos ĉi tiujn « plibonigojn », la lingvo fariĝos ekstreme logika, komprenebla kaj belsona ! Ni daŭrigu !

J. KAJŜ.

AVIZO. — Ni sciigas, ke S-ro Politzer ne estas plu laboristo en nia presejo jam de kelkaj semajnoj.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto ; **Paul Fruictier**, **Ch. Vêrax**, deleg.

Sekretario de l'administrantaro : **V. Chaussegros**.

Teknika direktoro : **Lengyel Pál**. — Sekretario de la gazeto : **William Mann**.

Poŝta keŝto.

AL MULTAJ. — Kvankam ni kontrolas zorge la sendadon de la gazeto, kelkaj abonantoj plendas, ke ili ne ricevis iajn numerojn. Tiuj ĉi perdigis dum la poŝta veturado. Ni ne povas, bedaŭrinde, preni sur nin la elspezojn necesajn por anstataŭi la perditaĵojn; ni do petas niajn abonantojn, ke ili plendu energie ĉe sia poŝta kontoro. Se oni volas ricevi novajn kajerojn, oni volu sendi al ni la jenajn specialajn sumetojn speciale difinitajn por tiu okazo: 0 fr. 15 centim. por unu kajero sen literatura aldono, kaj 0 fr. 25 centim. kun la aldono. Oni povas sendi por tio poŝtmarkojn.

AKCIOJ DE LA P. E. S.

Kelkaj samideanoj, kiuj ne povas finpagi ĉiujn akciojn menditajn de ili, deziras ilin vendi.

Ni petas tiujn legantojn, kiuj volus ilin aĉeti, ke ili turnu sin al la administrantaro de la Societo.

La prezo de unu sola akcio (kun ĉiuj vendaj elspezoj kaj impostoj) estas nun 27 frankoj (anstataŭ 25). Se oni aĉetas kelkajn samtempe, la elspezoj proporcie malgrandiĝas. La pago povas esti farata en kelkaj fojoj. Ni rememorigas, ke laŭ la regularo de la Societo kaj laŭ la francaj leĝoj, kiuj regas ĝin, ĉiu societano havas rajton eksigi el la societo kaj postuli repaĝon de siaj akcioj. Tio fariĝas ĝis difinita limo, klarigata en la regularo de la Societo (broŝuro senpaga por akciuloj; kostas 25 centimojn por ne akciuloj). Informojn oni povas ricevi ankaŭ ĉe S-ro Cotellet, notario en Parizo, 25, Bd Beaumarchais, kiu tenas la dokumentojn.

La regularo de la Societo difinas, ke la akcioj ricevos *el la netaj ĉiujaraj profitoj*: 1-e, 4 % el sia nomvaloro (t. e. 1 franko), 2-e, ĉion, kio restos el la profitoj post disdono de parto da ili al rizervaĵo, materialo, laboristoj, administrantoj, k. t. p. de la societo.

Tiu disdono fariĝas post propono de l'administrantaro, kaj decido de ĝenerala kunveno de l'akciuloj, kiu devas fariĝi ĉiujare antaŭ la 30-a de junio.

Ĉiu akciulo havas respondecon en la aferoj de la societo nur por siaj akcioj kaj ne povas esti persekutata post ilia plena finpago.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO.

Avizo al niaj abonantoj.

Pro la teknikaj malhelpoj klarigitaj en folieto aldonita al nia lasta numero, ni devis malmultigi la paĝojn de nia hodiaŭa kajero por eviti tro longan prokrastadon: — La venonta kajero eliros ĝustatempe kaj kun la ordinara amplekso.

Ni petas de niaj abonantoj senkulpigon por tiu ĉi kontraŭdezira malakurataĵo kaj esperas, ke ĉio estos denove baldaŭ en ordo.

Kuracado per Esperanto

S-ro **Oberlehrer Gell** el *Worms*, Germanujo sciiginte pri *Viksolo* per anoncoj de la esperantaj ŝlosiloj skribis al ni :

« Mia edzino suferas per Astmo de 4 jaroj. La atakoj estas periodaj kaj de sufoka naturo tiel terura, ke la anima premiĝo ŝin ofte igas deziri la morton.

Si perdis de sia suferado 20 funtojn da korpopezo kaj la kuraciloj ĝis nun uzataj estinte senutilaj, mi petas vin sendi la *Viksolilaron* laŭ viaj kondiĉoj nome :

Senpaga trisemajna provo. Pago de la honorario, se mia edzino resaniĝos. Resendo de la ilaro, se *Viksolo* malsukcesos. »

S-rino **Oberlehrer Gell** raportas :

La trisemajna provo finiĝis kaj mi pagis hodiaŭ al via banko vian honorarion.

... Astmo ne plu estas al mi la iama teruraĵo.

De la aplikado de *Vikzolo* ĝi estas malaperinta kaj kiam ajn ĝi minacas ree aperigi, sufiĉas kelkaj enspiradoj por tuj formovi la timigan spiradan malhelpon.

La faciligo komence ne venis tuj. Mi jam ektimis, ke mi malsukcesus.

Tamen kiam al mi prosperis profunde enspiri kaj la atemigilo donis grandan nubon da *Vikzol-vaporoj* revenantan tra la buŝo, tiam la mukaĵo amase liberiĝis kaj de tiu tempo mi ree povas facile spiradi.

Mi tion ĉi konstatas kun granda ĝojo kaj dankemo kaj mi permesas al vi uzi tiun ĉi ateston, kie ajn vi ĝin juĝas esti utila.

Esperantistoj konantaj astmulojn, kiuj eble estas ruinigitaj sian sanon per la kutima uzo de la tiel nomataj astmaj pulvoroj, estas kore petataj sendi al ni iliajn adresojn, por ke ni sciigu ilin pri nia rimedo gasoforma en poŝo kun si portebla, kiu jam redonis la sanon al

pli ol 1500 astmuloj.

Por ĉiuj 6 adresoj alsendotaj ni donacos duonjarabonon de la *Brita Esperantisto*.

Skribu Esperante al

The Vixol Syndicate

304, Brixton Hill, LONDON S. W.

S-ro FEDOR POSTNIKOV sciigas siajn amikojn, ke li ne loĝas plu en Vladivostok. Lia nuna adreso estas S-ro FEDOR POSTNIKOV, Inĝeniero, en *San Francisco*, Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj.



INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomen-
data de S. F. p. p. B., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe
ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por al-
menaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 59, Phalsbourg, Le Hâvre, Franci.

Enigmo

En lando naskiĝas mirakla likvoro :
La Dioj favoris per ĝi la homaron.
Ĝi tute similas fandaĵon el oro
Kaj eĉ ĵaluzigus la sunradiaron.

Verŝite sur ondojn ŝvelintajn pro vento,
Ĝi tuj kvietigas la ŝaŭmon de l'maro :
La flava likvoro en unu momento
Konservas la vivon de la maristaro.

Per ĝi sin frotadis l'antikvaj atletoj
Por iĝi pli fortaj en la batalado.
La pastroj ĝin ĉerpas el orboteletoj
Por krei novpastrojn per sankta ŝmirado.

Ĝi al ni ĉefverkojn pentradajn liveras
Kaj eĉ pli ol unu ĉefverkon bongustan
En la kuirado. — Mi tion esperas,
Vi trovis la vorton respondan kaj ĝustan !

Sed pluajn klarigojn vi eble deziras :
« En kiu mistera planedo aŭ stelo
Ni tian likvoron eltrovos, vi diras,
En kiu edeno, en kiu ĉielo ? . . .

Se ne en ĉielo, en kiu terparto ? »
— Sinjor' LANISSON, de Salon, en Franclando,
Tuj post la ricevo de simpla poŝtkarto
Rapidos respondi al via demando,

Grava avizo.

La divenintoj de la ĵus proponita enigmo ricevos grand-
valorajn premiojn. Al ĉiu el ili mi donacos po unu specimeno
de miaj bonegaj Provencujaj produktaĵoj (olivoj, olivoleoj, sa-
poj, ktp.) kun unu beleta cirkulero presita en Esperanto ; kaj,
se miaj komercaĵoj plaĉos, po unu *tre interesa fakturo Espe-
ranta*.

Oni sendu la solvon de l'enigmo, la diversajn petojn kaj la
mendojn al S-ro **Lanisson**, en **Salon** (*Provence*) **Franc-
ujo**.

S-ro LOUIS PÉRIARD, Auxerre (Yonne) Francujo, deziras
korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj
poŝtkartoj aŭ leteroj.

S-ro **Nyáry Pál**, ev. ref. lelkész (= pastro), en Pécs (Hungarujo), deziras korespondi kun Genevaj esperantistoj.

— Aŭtoro de Esperanta stenografio laŭ franca metodo Prevot-Delaunay. *Cu iu samideano konsentus preni sur sin la preselspezojn de mia verketo? — ĉiujn profitojn de la afero kompreneble mi forlasus al la afablulo.*

S-ro **L. Sáfar**, en Debreczen, *Egyház-tér 7. sz.*, Hungarujo, — volas korespondi, precipe kun ekstereŭropaj geesperantistoj.

HELSINGFORS, Finnlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

Baldaŭ aĉetebraj ĉe la **PRESA ESPERANTISTA SOCIETO**

— — **MUZIKNETKOJ** — —

En songo, teksto de *D-ro Zamenhof*, muziko de *Josée Guivy*,
1 fr. 60 c.

Himno, teksto de *Profesoro Dombrowski*, muziko de *Josée Guivy*, 1 fr. 50.

S-ro **PIERRE DÉRIBÉRE-DESGARDES**, medicina kaj scienca studento, 76, rue des Saints-Pères, Paris, interesiĝante pri medicino, botaniko kaj fitoterapio, deziras korespondadi pri tio.

Esperanta oficisto bezonata.

La Esperanta eldonejo

MÖLLER & BOREL, BERLIN, *Prinzenstrasse 95*

deziras **oficiston-kunlaboranton**. Perfekta kono de Esperanto necesa; kono de germana lingvo dezirinda. Salajro laŭ la cirkonstancoj. — Skribu al la ĉi supra adreso.

Arthur GRAY, (10994), 138, *Bethune Road, Stamford Hill*, LONDONO, N., deziras informojn kaj korespondon pri la Ciganoj (Nomaduloj) de ĉiu lando kiel en Eŭropo tiel en Azio, kaj pri iliaj lingvo kaj dialektoj, ktp. Dankeme respondos.

Hjalmar Bäckström, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

« **Esperanto** » propaganda gazeto
en lingvo franca.

Unu numero 10 centimoj, 24 numeroj sinsekvaj 3 fr. Sin turni al la *Presa Esperantista Societo*, aŭ al l'administranto de *Esperanto* : Sinjoro **PAUL BERTHELOT**, Céret, P.-O. Franc-lando.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO, 33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

